

Llucma

LA LASTA POEMO

DE
JAUME GRAU CASAS



BARCELONA

1936

5989

Doublet

LA LASTA POEMO



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

6864

16x2017 hef006864JC

[The main body of the document is extremely faint and illegible due to heavy noise and low contrast. It appears to contain several paragraphs of text.]

THE UNIVERSITY OF CHICAGO

PHYSICS DEPARTMENT



JAUME GRAU CASAS

(Naskiĝinta en Barcelono la 2 decembro 1896)

LA LASTA POEMO

DE

JAUME GRAU CASAS



BARCELONA

1936

AL MIA PATRINO

Pro via frua morto mi vin ne rememoras,
mi povas iel diri, ke mi ne konis vin ;
sed tamen tute ofte mi vin funde priploras...
ĉar vi simile iam priploris ankaŭ min.

Ne estas kon', memoro, sed vin mi ne ignoras,
mi sentas en mi ion el via propra sin' ;
perdita lula vorto eĉ nun vjbras, sonoratas,
aŭ en silenta vivo mi nur imagis ĝin.

Min vivo ne dorlotis, vi ankaŭ ĝin ne povis,
neniam miaj vortoj respondon vian trovis,
ne sentis mi karesojn patrinajn, el la kor' ;

sed en momento ĝoja aŭ en moment' ĉagrena,
en horo plej intima, en horo plej solena,
vivadas en mi ĉiam, patrin', via memor'.

AL MIA FRATINO

Fratino: ankaŭ niaj destinoj estas frataj;
ni same luktis kontraŭ malver' kaj hipokrit';
por ambaŭ ni la vojoj de l' viv' ne estis glataj,
vivbaroj niaj estis montaroj el granit'.

Malsano sur ni pezis en horoj senkompataj;
sentemo tro viveca kaj troa korekscit'
akcentis la ĉagrenon de l' baroj renkontataj;
la korpo—tro malforta; tro vigla—la spirit'.

Sed ne malhelpas troa pasi', tro da esprimo,
ĝi ŝprucas el la grandaj profundoj de l'animo,
el forta personeco, el vigla karakter'.

Ke la spirite etaj personoj rampu tere
en ŝajna sereneco, kviete, senkolere,
malplenaj, en silento, sen bril' kaj sen fier'.

AL MIA EDZINO

Hodiaŭ mi plej ĝoje rigardas vin, edzino,
pensante ke unue vi estis amikin',
ke poste niajn vivojn kunigis la Destino,
ke vi de mia kara idar' iĝis patrin'.

Sed ĉiam por mi restos vi kara fianĉino,
belega, juna, dolĉa ĝis komplezem' sen fin';
vi ĉiutempe estis kaj restas l' amatino:
amiko, edzo, patro kaj vir'... mi amas vin.

Pro mi suferis vi malĝojon kaj mizeron,
sed ne memoru nur doloron kaj suferon:
post malfeliĉa tago, venas feliĉa hor'.

Ni ridas dum mateno, dum posttagmezo ploras,
sed dum la tuta tago gefilojn ni adoras,
kaj nokte ĉiam restas amplena nia kor'.

AL MIA FILINO

Mi pleje amas vin, ho ĉarma filineto,
burgono nia, revo, espero kaj promes'.
—Ke vi feliĉe kresku!—flustras patrina peto.
—Ke, kun via frateto, vi ludadu sen ĉes'!

Ke malĝojo de l' vivo por vi restu sekreto!
Ke ne sufoku vin la vivo-malsukces'!
Ke de viaj gepatroj vi fariĝu portreto,
sed vi trovu ĉe l' mondo iom pli da kares'!

La gepatroj por vi ĉian bonon deziras,
kaj, vidante vin kreski, ili sole sopiras
ke ĉe vi plensanĝiĝu la fatala destin'.

Vi fariĝu sentimaj, eltenemaj, kuraĝaj,
eĉ en saĝaj momentoj estu iom malsaĝaj
kaj ne ĉiel klopodu imitadi vi nin.

LAŬDO AL LA KISO

Nenio tiel nobla kaj spirita,
nenio estas tiel flugilhava
kiel kiso de am' varme donita,
kiel kis' ricevita kun ĝoj' prava.

Nenio estas por la kor' pli rava,
nenio por l' animo pli incita,
nenio por feliĉ' estas pli grava,
nenio por la vivo pli benita.

Kiso rapide kaj subtile venas
kaj ĝin la lipoj el la lipoj prenas
arde, pasie, kun elkora flamo.

Ĝi de la koro ĝis la buŝ' sin levas,
kaj homo tiam ne plu amon revas:
en kiso estas jam la tuta amo!

OKULA INTERPAROLADO

Per pasia rigardo mi demandis,
kaj ŝi respondis per rigard' amika ;
la ama varm' de mia vol' fortika
jam ŝian korglacion tute fandis.

Ŝia rigardo montris, elokventa,
ke ŝi komprenas, kion diri timis
mia buŝo kaj tamen plenesprimis
miaj okuloj en parol' silenta.

Montris ŝia rigard' ke ŝi min amas
kaj ke ŝi *min* akceptus kun prefero.
Kial do ne ĝojigas min espero
kaj mian amon mi ne tuj proklamas ?

De tiam mia koro ŝin aklamas
kiel Reĝinon sur la tuta tero.

EROTIKA POEMO

(SKRUPULAJ LEGANTINOJ
TRANSSALTU ĈI TIUN ERO-
TIKAN POEMON.)

Mi volas kanti ŝin, kiam ŝi, nuda,
en siajn brakojn ame min akceptas,
de ŝia korp' la varmon mi perceptas
kaj ŝi karesas min per gesto luda...

Mian kapon ŝi prenas
kaj ŝi kisadas min arde, pasie...
Je ŝia ama varm' tiam ebrie,
mi ĉe la brusto ŝian bruston tenas.

Niaj buŝoj kuniĝas
kaj longe per kis-vortoj ekparolas...
Sorbi la lumon de l' okuloj volas
niaj okuloj, kie am' montriĝas.

Ŝia hararo falas superbela,
mirige nigra sur la korpo blanka
kies helan nudecon mi avidas.
Kun forta ĝuo — sur la ter', ĉiela, —
ŝin karesante kun admiro danka,
belecon ŝian en ekstaz' mi vidas.

De ŝia haŭto silka, mola, varma,
la kontakton ebrie mi plenguas ;
ŝi min rigardas kun rideto ĉarma...
ardaj ekstremoj ambaŭ nin trafluas.

Timema lipkares' sur ŝiaj mamoj
ŝian karnon tremantan elincitas,
kaj rigardo kaj gesto min invitas
al dia ĝuo de plej homaj amoj.

Kaj ekfalas ni ambaŭ, kunplektitaj
niaj brakoj en forta ĉirkaupremo ;
nin skuas amo kun persista tremo...
ekkrioj sonas de amĝoj', subitaj...

Niaj buŝoj ankoraŭ restas kunaj
kaj min ligas al ŝi brakoj-serpentoj...
samritme batas niaj brustoj junaj...
ruĝigis miajn lipojn ŝiaj dentoj.

Vi donu vin al mi, ho belulino,
kaj mi ne volos plu alian ĝojon ;
mi havu viajn brakojn kiel vojon
kaj vian luman ventron por vojfino.

Nemo ĉe la mond' krom vi valoras
eĉ plej malgrandan kaj facilan penon ;
mi havu viajn brakojn kiel ĉenon
kaj vin por vivkarcer' : mi vin adoras !

Mi volas vivi nur ĉe brakoj viaj,
per viaj kisoj kaj frenezaj ardoj ;
mi bruliĝu pro viaj amrigardoj ;
mortigu min ĉe vi ĝuoj ebriaj.

Sur vi de amo mia korpo tremu,
karnon ĉe karno kun la tuta torto :
ni unu al alia nin alpremu
en Vivo-spasmo ĝis alvenos Morto !

1921

AL JULIO BAGHY

Per *frost*o, *mizero*, *veado* kaj *larmo*
kovriĝas la perloj de via inspir'.
Sed tamen en ili ne estas malvarmo:
nur — arda sopir'!

Sopiro je nobla, perfekta nomaro,
ne plu makulita de sang' kaj mizer';
de paco, justeco, feliĉ^o—granda maro
tra tuta la ter'.

Deziro je frata rilat' inter homoj
kaj inter popoloj; de vir' al virin';
amema kunigo de ĉiuj atomoj
de l' spaco sen fin'.

Kaj dumc kor' via—la centro de Amo—
suferas pro ĉia doloro kaj ĝem'.

Sed ĉiu fajrero de via korflamo
fariĝas poem'!

AL NIKOLAO HOHLOV

Kun formo perfekta—laŭ greka statuo—
aperas la kanto de via fervor';
de ritmo, majesto, plastik' — triunuo:
poeta trezor'.

Sub vervo trankvila, esprimo serena,
sin kaŝas eksplodo de forta pasi',
vulkano de justaj postuloj tutplena,
sed ja — harmoni'.

En via vers' flua, parol' diafana,
ideoj kaj sentoj estiĝas kristal';
kaj via vort' estas vok' samideana
al mondideal'.

El via lir' sonas ĉiela muziko
dolĉege reviga pri sorĉoj, fabel'.
Agordas la liron surtera mistiko :
 adoro al Bel' !

AL K. DE KALOCSAY

Kun spiro profunda, fekunda inspiro,
vi supren levigas al alta Parnas',
per viglaj flugiloj kaj forta deziro
de nova Pegas'.

En strofoj ĉizitaj aŭ krioj liberaj,
kun goj' intelekta aŭ koremoci',
vin ravas la koto de vivoj tre teraj
aŭ Mitologi'.

Vi estas koloso de nia liriko,
kun forto kaj digno, kun amo kaj vol' ;
post viaj verkaĵoj estigos klasiko
por nia popolo'.

Popol' al vi mankas : al ni — la Homaro !
Sed la naskiĝanta mondliteratur'
proklamos vin iam moderna Pindaro
de l' monda kultur' !

DEDIĈO AL K. DE KALOCSAY,
SUR EKZEMPLERO DE
«KATALUNA ANTOLOGIO»

Al vi, poet' senkompara,
kiu kantas kun pasi'
pri la nacio hungara,
pri tutmonda harmoni',
vokas jen per voĉo klara
kataluna poezi' :
ĝin alloga trovi vi,
alta poeto hungara.

Al vi estu bela, kara,
«Katalun-Antologi'» ;
porhungara, porhomara
amo' estas ja en ĝi.
Alta, nobla, brila, klara
lingvo, penso, emoci' :
kataluna kaj hungara
kaj tutmonda poezi' !

AL FRAULINO LÉA LAGENÈS

De kiam mi vin ekrimarkis,
via beleco ravis min ;
vi estas floro eksterlanda
kun kolor' ĉarma, hela bril'.

Mi trovas vin tre simpatia
pro via luma dolĉ-rigard' ;
mi volus ke la sud' pasia
donus al ĝi nur pli da ard'.

Virino tre originala
vin mi alnomis kun admir' ;
vi estus dia, ideala,
por mia koro kaj dezir'.

EN LA SOLENA MALKOVRO DE MEMORTABULO
ĈE LA STRATO DOKTORO ZAMENHOF

Per bronzo fortega kaj hela marmoro
la nomon de l' Majstro ni volas vivigi,
al lia glornomo plej varme kunligi
admiron kaj amon el fundo de l' koro.

El bronzo fariĝu la Brust' en batalo
por paca kaj plena kompreno de l' homoj,
kaj mortos por ĉiam mallumaj fantomoj
pro l' helo persista de l' mond-idealo.

Per varmaj paroloj la Majstro deziris,
ke nia ĉefurbo vivkresku kaj floru;
pro tio delonge ni ĉiuj sopiris,
ke l' urbo dankeme la Majstron honoru.

Genian aŭtoron de l' lingv' Esperanto
glorkronu precipe ni eta popolo:
en tempoj malbonaj ĝi estis konsolo,
nur nun patrolingve laŭtigas la kanto.

Eterne lin benu, ho gent' kataluna,
kaj daŭre lin amu, vi Barcelonanoj:
hodiaŭ radias jen horo brilsuna
kaj fine ni staras kun manoj ĉe manoj.

14 aprilo 1932.

SALUTO DE GASTO

Al la XIV^a Kongreso de S. A. T. en Valencio

Saluton varman, el la kor',
al laborista mondkongreso;
al viaj penoj kaj labor'
estu triumfo kaj sukceso.

Voĉ' kuraĝiga jen por vi
de gast' — ĉu tuj kunbatalonto? —
en nuna temp' de dolor-kri',
de bruta fort', faŝisma honto.

Prefere — ruĝo de standard'
flagranta kiel batalsigno,
pli ol perfido de ponard'
mortiga por la homa digno.

Milfoje sanga mortbatal'
por nask' de justa homsocio,
antaŭ ol mort' de l' ideal'
ĉe l' burĝa ideologio.

Kun abomen' mi krias: fi!
al hipokrito de la mondo.
De l' Just' fariĝi volas mi
jam kavaliro-vagabondo!

Aŭgusto 1934.

LA LASTA POEMO

Ne plu la vivo sin prezentas
al mi sub bril' de hela sun' ;
kaj nun — kruela pun' ! — mi sentas
ke jam forflugis mia jun'.

Troa pasio, troa sento
estis turmento por la kor' ;
pro troa viv', troa silento,
ĝin skuis vento de dolor'.

De l' vivo sub la uragano
mi tremis, falis kiel kan' ;
iĝis Sufer' mia tirano
kaj min ekmordis la malsan'.

Aminte teron kaj aeron
mi restas nun en malliber'
kaj plene konas hommizeron
kaj la suferon de l'infer'.


Koninte nur vortojn kaj sentojn
de la spirita ama flam',
mi sentas nun nur la turmentojn
de vengosent', besta malam'.

Ne plu mi trovas en mi rimon
por dolĉaj sentoj de l' anim',
ĉar buŝo ĵetas nur esprimon
pri krimo, ŝlimo, cim' kaj lim'.

En la malvasta kaĝo-ĉelo
homo-poet' ne kantas plu
kiel la birdoj en ĉielo
vidataj tra l' fenestro-tru'.

Akra, terura, la ĉagreno
de l' kor' al buŝ' ŝprucas en li...
lipojn sekigis viv-veneno...
formortis jam la Poezi'!

(Barcelona Malliberejo, decembro 1934.)



ENHAVO

	Paĝoj
Al mia patrino	5
Al mia fratino	6
Al mia edzino	7
Al mia filino	8
Laŭdo al la kiso	9
Okula interparolado	10
Erotika poemo	11
Al Julio Baghy	14
Al Nikolao Hohlov	16
Al K. de Kalocsay	18
Dediĉo al K. de Kalocsay, sur ekzemplero de «Kataluna Antologio»	20
Al fraŭlino Léa Lagenès	21
En la solena malkovro de memortabulo ĉe la strato Doktoro Zamenhof.	22
Saluto de gasto al la XIV ^a Kongreso de S. A. T. en Valencio.	24
La lasta poemo	26

VERKOJ DE JAUME GRAU CASAS

ESPERANTAJ

- AMAJ POEMOJ, Barcelona, 1924.
LA KATALUNA POPOLKANTO, Barcelona, 1925.
KATALUNA ANTOLOGIO (Unua eldono), Barcelona,
1925.
BARBARAJ PROZAĴOJ, trad. el la kataluna Prudenci
Bertrana. Leipzig, 1926.
NOVAJ AMAJ POEMOJ, Barcelona, 1927.
PRIMER MANUAL D'ESPERANTO, Barcelona, 1930.
KATALUNA ANTOLOGIO (Dua eldono), Barcelona,
1931.
CURS COMPLET D'ESPERANTO, Barcelona, 1934.
LA LASTA POEMO, Barcelona, 1936.
POEMO DE AMO KAJ DOLORO, preta por presado.
KOMPILO DE LA POEMOJ DE ARTUR DOMÈNECH,
preta.
LA KATALUNA NACIO, preta.
LA KATALUNA KULTURO, en preparo.
LA KATALUNOJ LAŬ FREMDA JUĜO, en preparo.
HISPANA ANTOLOGIO, en preparo.

TROBADOROJ PROVENCALAJ - KATALUNAJ, en preparo.

VORTARO ESPERANTA-KATALUNA, en preparo.

DICCIONARI CATALÀ-ESPERANTO, en preparo.

EN KATALUNA LINGVO

RECORDS DE LA PRESÓ (Rememoroj el la malliberejo).

SOMNI D'UNĜS DIES DE JUNY (Poemoj).

SANT JUSTÍ DE VALLBONA (Romano).

DEL PARNÁS DELS POBLES (Kataluna traduko de Esperanto-poemoj).

POEMES REVOLUCIONARIS

EN HISPANA LINGVO

EL SUPLICIO DE TÁNTALO (Poemoj).

CARTAS DE UN «SEPARATISTA» CATALÁN A UNA AMIÇA CASTELLANA